

# Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelijks  
Zestiende jaargang  
Nummer 1 (175)  
JANUARI 1949

Vertegenwoordiger in Nederland :  
LEEN  
sekr. : Stationskade 6, Amsterdam Z.  
postrek. 34563 van P.M. Mabeoone  
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de  
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND  
POSTBUS 342, BRUSSEL  
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN :  
\* Leden : 75 fr.  
\* Steurleden : min. 150 fr.  
Inwonende leden : 25 fr.  
(\* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN :  
België : 60 fr.  
Nederland : 4 fl.  
Ceteraj landoj : 75 bfr.  
Proefn. : 5 fr. (1 r.k.)

## Bene, Lukse...

Nederlando parolas :

Rezultato de la referendumo : 198 por ; I kontraŭ !  
La aprobantoj de la kunlaborkontrakto kun F.L.E. estus estintaj ankoraŭ pli multnombraj, se multaj sekciaj sekretarioj nur scipopovus legi...

Jen, do, karaj nederlandaj legantoj, la unua numero de *Nederlanda Esperantisto* en *new-look*. Eble vi iom mire rigardas ĝin, ĉar ĝi ja tute alia aspektas ol la « antaŭulo », eble vi iom malfide strabas al ĝi, ĉar kelkajn rubrikojn, kiuj regule aperis en la *malnova* gazet(et)o, vi vane serĉos ; aliajn vi, post esplorado, trovos eble en loko, kie vi ne atendis ilin kaj, legante, vi sendube haltos ĉe rubrikoj, nomoj, ĝis nun nekonataj. Sed bonvolu ne forgesi ke ankaŭ niaj flandraj geamikoj, eble senplezure, konstatas ke « ilia » gazeto tie kaj for tute ŝanĝiĝis.

Espereble, vi baldaŭ trovos la vojon en la gazeto, kiu unuavide povas impresi iom « labirinta » al ni. Al ni, vere, ĉar sciu ke ankaŭ mi, la redaktoro de la nederlanda parto, iom funebras pro la morto de la *malnova* N.E., tiel kara al mi, kaj ke ankaŭ mi ne sentas min



La subskribintoj de la BENELUX-KONTRAKTO : de maldekstre dekstren : S-anoj Cortvriendt, Baas, Mabeoone, Van Gindertaelen kaj Maertens.

hejme ! Ĝis nun mi kutimis mem, en la presejo, aranĝi la enhavon kaj la sinsekvon de la artikoloj kun la presisto, sro J. Schokker, en Amsterdam, sed nun mi ne plu faros tion, kaj lasos tiun taskon al la ĉefredaktoro, dro T. Van Gindertaelen, ĉar de nun nia gazeto estas presata en *Flandrujo*. Por la *Almelo*-kongresanoj, dro T. Van Gindertaelen, estas jam « malnova » konato. Mi konas lin kiel tre spertan esperantiston, kiu certe kiom eble plej bone aranĝos la aferon kaj ĉiel klopodos havigi al vi legindan kaj plaĉaspektan gazeton. Se ĉio ne estos tuj laŭ via gusto, nu, ne tuj grumblu kaj indulgu la kompatindajn redaktorojn, kiuj same kiel vi devos kutimiĝi al la novaj cirkonstancoj. Se vi havas kritikon, sugeston, deziron, nu, kuraĝe kaj rekte skribu al ni ; se la nova gazeto plaĉas al vi, montru ĝin al samideanoj, ne ankoraŭ membroj de LEEN kaj anigu ilin al la asocio aŭ almenaŭ abonigu ilin (jara kotizo : g. 2.25).

Anticipe afable dankante, ankaŭ en la nomo de mia kolego, dro T. Van Gindertaelen, mi samideane manpremas kun ĉiuj ĝisnunaj fidelaj legantoj.

Mr. A. J. Kalma

Kaj jen *Flandrujo*

Kun ĝojo mi salutas, kiel ĝenerala membro de LEEN kaj kunredaktoro de la nederlanda kaj flandra organoj resp. de LEEN kaj VEB, la legantaron kaj pli speciale la « verdan » Nederlandon, ĉe la sojlo de 1949 kaj de N.E. en *new-look* !

Mi nepre konfirmas la vortojn de mia tro modesta kaj tro ĝentila kolego, Mr. A. J. Kalma, kiu kunlabore kun mi prizorgos la redakcion. Kiel li, mi petas vian indulgon, se komence la « flandra » impresas iel stranga al la LEEN-membroj kaj la « nederlanda » iom nekutima al la VEB-anoj ! Kaj ne malpli se, dum kelkaj monatoj la litertipoj kaj la divido de la gazeto ne tute plaĉos al vi : ni ja devas gvidi la tutan redakcian entreprenon, preskaŭ sen buŝaj pritraktoj, kaj tial, iom da adaptiĝo estas postulata.

Karaj legantoj, helpate de vi, ni unuafaje ekpaŝas la fekundan vojon de kunlaboro : tio okazu *bene* por LEEN kaj VEB, kaj *lukse* konsidere al la rezultatoj kaj la plua disvolvado de la movado kaj de la membraro.

Dro T. Van Gindertaelen

Al ĉiuj siaj membroj  
al ĉiuj siaj legantoj  
deziras Novjaron  
felician, prosperan  
L.E.E.N. — F.L.L.E.

## Nederland en Esperanto op de kweekscholen

Het Bureau : « Esperanto bij het Onderwijs » heeft het volgende verzoekschrift gezonden aan de Minister van Onderwijs, Kunsten en Wetenschappen :

Amsterdam, 1 November 1948.

Ondergetekende, P. W. Baas en H. H. Suurmans, respectievelijk voorzitter en secretaris van het bureau « Esperanto bij het Onderwijs », gevestigd C. Krusemanstraat 43, III te Amsterdam, verzoeken Uwe Excellentie met verschuldigde eerbied in opdracht van de bij genoemd bureau aangesloten organisaties :

het Esperanto zo spoedig mogelijk te doen opnemen als verplicht leervak in het onderwijsprogramma van alle kweekscholen voor onderwijzers en onderwijzeressen in ons land.

Hetwelk doende, enz.

P. W. Baas, voorzitter.

H. H. Suurmans, secretaris.

Toelichting bij het verzoek :

Bij de behandeling van de begroting voor het jaar 1948 zei Zijne Excellentie : « Voor het verplicht stellen van Esperanto als vak ben ik niet te vinden, maar aangezien de gemeente- en schoolbesturen eventueel aan een verlangen daarnaar willen voldoen, wil ik toch wel overwegen om het vak althans facultatief te stellen », woorden, waarvoor wij gaarne onze erkentelijkheid uitspreken.

In de Memorie van Antwoord op het Voorlopig Verslag betreffende het « Wetsontwerp tot wijziging van de Lageronderwijswet 1920 » lezen we o.m. : « Intussen ontmoet het si geen enkel bezwaar, indien het Esperanto zijn intrede doet op de lagere school langs de weg van art. 25 lid 5 of art. 90 lid 6 », terwijl Zijne Excellentie 19 Mei j.l. in de Tweede Kamer deze uitspraak nog eens bevestigde met de woorden : « ..... omdat ik, ..... iedere aanvraag, mits zij aan de deugdelijkheidseis voldoet, zal inwilligen ».

Reeds 2 Mei 1934 heeft de Nederlandse Esperantisten-Vereniging « La Estonto Estas Nia » zich tot de Tweede Kamer gewend met het verzoek « het daarheen te willen leiden, dat bij bedoelde regeling (d.i. van de opleiding van onderwijzers) het onderwijs in het Esperanto als verplicht vak in het leerplan voor de Rijkskweekschool voor onderwijzers en onderwijzeressen worden opgenomen ».

Dat ons bureau zich thans opnieuw tot Uwe Excellentie wendt met een soortgelijk verzoek, is te verklaren door het feit, dat het bureau weliswaar met genoegen kennis genomen heeft van de gedane toezegging, doch geenszins bevredigd is. Immers, het streeft naar de invoering van het Esperanto op alle scholen, in de eerste plaats de lagere.

Blijkens publicaties van recente datum gaat nog altijd 80 pct. van de Nederlandse jeugd het leven in zonder kennis van een vreemde taal en blijft daardoor verstoken van een zeer gewenst communicatiemiddel voor het verkeer met buitenlanders. Het bureau is van mening, dat hierin ten spoedigste verandering moet komen. Verplichte invoering van het Esperanto op de lagere scholen zou een afdoende oplossing zijn, maar gebrek aan daartoe geschikte leerkrachten maakt dit onmogelijk. In dit gebrek zal allereerst moeten worden voorzien en het bureau ziet als enige afdoende maatregel de verplichtstelling van Esperanto op de kweekscholen.

Tevens zou daarmede naar de mening van het bureau de moeilijkheid van de garantie der deugdelijkheid voor de toekomst zijn opgelost. In de leerplannen der kweekscholen zou de gewenste waarborg gevonden worden. Wanneer daarnaast Uwe Excellentie zou kunnen besluiten, de aan onderwijzers uitgereikte Esperanto-B-diploma's als officiële bevoegdheid te erkennen, dan zou naar de mening van het bureau een bevredigende oplossing zijn bereikt.

Het is ons bekend, dat als bezwaar tegen de invoering op de kweekscholen wordt aangevoerd, dat het programma reeds overluden is. Wij ontkennen dit niet, maar wensen toch naar voren te brengen, dat wij van mening zijn, dat op de kweekscholen met twee uur per week in de twee eerste leerjaren, en één uur per week in de twee laatste leerjaren zal kunnen worden volstaan. Wanneer eenmaal de aanstaande kwekelingen reeds Esperanto geleerd zullen hebben, zal zelfs één uur per week in alle leerjaren voldoende zijn.

Er zal dus tijd gevonden moeten worden ten koste van andere vakken. Het bureau is echter van mening, dat dit offer gebracht moet worden ten bate van het welzijn van de Nederlandse jeugd in het bijzonder en ter wille van het internationale verkeer van mens tot mens in het algemeen.

Deze zaak heeft ook een andere kant. We willen niet te uitvoerig zijn en zullen daarom volstaan met de volgende uitspraak van Dr. W. J. A. Manders, leraar in de klassieke talen te Venlo :

« De tijd, die aan het Esperanto besteed wordt, zal bij verdere talenstudie met rente worden teruggewonnen. »

## LA SENĈAPELA MANIO

Eĉ jarojn antaŭ ol la viroj komencis promeni senĉapele, al kelkiuj en Esperantujo jam ne konvenis la ĉapele super niaj bone konataj literoj, eĉ ne la modesta buketo super niaj aŭ kaj eĉ.

Sed Zamenhof, kiu ĉiam atestis pri arta gusto, mem zorge elektis ĉi tiun ĉapelon, kiun s-ano Delcourt en « Franca Esperantisto » (n-ro 99) prave taksas *genia kompromiso inter grafismo kaj fonetiko*. Same opinias la lingvo-uzantoj, kiuj ne toleras ĝian senrespektan deĵeton, kvankam ili okaze ĝin elegante ĉifonigas aŭ, trorapidemaj, forgesas surmeti...

Lastatempe usona kapnudigema pastro, nomata *Kubacki*, ree elfosis la malnovan batalhakilon, sed oni ne bezonas esti profeto por antaŭscii ke la vekita bruoj, kiel antaŭe, estos sorbita de la silento, kvankam nun la eĉo ankoraŭ triligas la paperon de niaj gazetoj kaj la oreltamburon de iuj eminentuloj.

Atentu, ke ne temas tie ĉi pri la provizora, tamen ĝena, uzo de nesupersignaj presliteroj laŭ la sistemo de Zamenhof. La Majstro en la komenca periodo estis metita antaŭ saman situacion kiel ŝajne nun, kiam laŭdire la milito parte formangis la specialajn esperantajn literojn kaj la postmilito ne ankoraŭ ilin provizis, aŭ la Esperantistoj ne ankoraŭ povis sentigi al la presistoj la profiton zorgi pri tiu materialo.

Akcentante la konsekvencon uzon de la litero « h » kaj se necese la neuzon de la signo super « u » en la diftongoj, Zamenhof fakte liveris preskaŭ la plej kontentigan solvon. Estas dezirinde daŭrigi tiun metodon, sed nur en okazo de nepra neceso, en maŝinskribaj tekstoj kaj negravaj presajoj, prefere ol enkonduki fremdajn literojn, kiuj fusus la tipan vortbildon de Esperanto. Ni tamen ne vidus gravan danĝeron en la amendo de la regulec-regulo, koncerne la literon « h = hh », se ni interkonsente aplikus, laŭ la sugesto de s-ano *Kaloesay* en L.M. (n-ro 9-10) la felĉan formon « kh » (ĥoro = kĥoro). Tiu ununura, pravigebla kontraŭtradicia devio, ne estus tiom revolucia, kiom la postuloj de la principaj kontraŭĉapeluloj, kiuj elmontras la neeblecon trovi vivopovajn formojn kaj perfektigi la verkon de Zamenhof. Ĉar — forigante la uniforman kapveston — ili tuj aperigas plensignifan diversecon de kapoj. Iom nekonsekvence ni povus diri : « kiom da kapoj, tiom da ĉapoj », t.e. opinioj ĉar ili plejofte samopinias nur negative.

Invitante nin forlasi la sekuran vojon por eniri misterajn landojn de l' fantazio, ili laŭvice volas kredigi al ni, ke ni fortimigas la homidojn per niaj ĉapeloj kaj tiel, almenaŭ parte, malhelpas la ĝeneralan enkondukon de Esperanto...

Vere, ĉu ne estas tipa manifestiĝo de ia malsuperec-komplekso kredi aŭ kredigi, ke nia lingvo por sukcesi nepre devas adaptiĝi al fantaziaĵoj nur naskitaj de la inkub(acki) — songa demando : « ĉu vi estas kontenta pri tio, kion ni atingis post sesdek jaroj da intensa propagando... » (*Heroldo*, n-ro 17)

Vere, se Esperanto estus supernature perfekta, kiu kredus, ke ĝi pli ol ĝis nun, proksimigus al si la homojn ? Estas sendube aliaj pli gravaj kialoj ol ortografio, kiuj rolas sur la ethoma scenejo de la gvidata mondopinio. Ĉu eble nia ortografio aŭ io simila kaŭzis antaŭ la milito la perdon de Germanujo kaj post la milito tiun de la Sovietunio ?

Ŝajne la postmilita apatio pri pure spiritaĵoj movadoj ankaŭ iom infektis iujn el niaj plej fervoraj. Limigante en la tempo la signifon de la Zamenhofaj instigoj, *l'Espero*, *l'obstino* kaj *la pacienco*... ; *Nur rekte, kuraĝe kaj neflankigante*... ili ne sufiĉe konscias ke, en la revolucia periodo, kiun ni travivas, kaj en kiu apogeas la kulto pri la materio, ni minimume devas resti la fidelaj gardantoj — iel Vestaloj — de la sankta fajro, por ke ĝi ne estingiĝu. Se nia lingvo ne estus esence vivoforta, ĝi jam delonge estus volapükigita en la tombo de la forgeso ! Almenaŭ la samideanoj, kies verkojn ni admiras en la sinsekvaj linioj kun supersignaj literoj, ne estu esperantistoj kun eta espero aŭ metintaĵ falsan esperon en ŝanĝoj kiuj, laŭ la rimarko de *Rio Esperantisto* (n-ro 14) rompus la *unuecon*, enkondukus literojn (w, q, x, y) slavice ne troviĝantaj sur la skribmaŝinoj de multaj naciaj landoj, arĥaikigus la tutan ĝistiaman literaturon kaj (ni aldonas) iliajn proprajn verkojn.

Ju pli oni spertas la dubajn klopodojn de la « kompetentuloj », despli oni konvinkigas pri la genia laboro de la Majstro, eĉ en tio kion li ne definitive solvis aŭ lasis al la libera evoluo laŭ la provita recepto. Kaj rigarde al tiuj, kiuj opinias Esperanto troe dormanta, ni simplanimaj Esperantistoj, firme kredas, ke tutcerte la bela dormantino iam estos vekata de la Princo (ni singarde gvidu lin sur la bonan vojon) kaj ke li ne demandos al ŝi, ĉu ŝi jes aŭ ne portas ĉapelon, sed en tiu oportuna tempo edziniĝos ŝin. *Yve Murten.*



# OBSERVOJ LA STUDANTO



**DANKEMO.**  
Cefredaktoro Assen Grigorov malŝparis tujan kolonon en sia organo por nomi min «provokanto»: mi ja pravigis la represon en «Flandra Esperantisto» de la «por Sovet-Unio hontinda karikaturo eldonita de la nederlandaj SAT (?) -gvidantoj».

Efektive temas pri la por la propagando de Esperanto tre efika UNO-desegnaĵo «Als de tolken slaken», eldonita de la nederlanda esperantista asocio LEEN kaj represita en N.E. (17.3. 48) kaj en F.E. n° 167!

Ne disponante tiom da loko, mi bedaŭrinde ne povas reciproki la malŝparemon de la tre sagaca kaj tre bone informita Assen Grigorov... Cetere, laŭ li, mia «venena kaj kotoplena» artikolo vekis multajn protestajn leterojn, kiuj alvenis... ĉe li, en Sofia!

Unu, subskribitan de la sinjoro Verne (untainomo Yron — ne Jules!), «Kapitano FTPF, Militkrucito de Rezistado kaj ano de la Granda Komunista Partio de Francujo», li citas.

Lia Kapitano Moŝto solene avertas min, ke la eksoldatoj de la Rezistado ne plu toleros miajn insultojn, kaj li severe riproĉas al mi mian maldankemon al Sovet-Unio, kiu liberigis Eŭropon de la faŝismo.

Nu, mi, la Kapitano Moŝto ne koleru: mi konfesas ke mia dankemo al la bolŝevismo-liberiginto-de-la-faŝismo almenaŭ egalas la dankemon kiun mi povus senti por la faŝismo-liberiginto-de-la-bolŝevismo... Jesu, mi posedas aĉan karakteron, ĉar al mi plaĉas neniu saŭco laŭ kiu oni pretendas min kuiri kaj formangi.

PIK.

## ESPERANTO-TONEEL.

In Duitsland, het land van dichters en filosofen en toneelkunst werd een rondreizend toneelgezelschap opgericht onder leiding van Prof. A. Steynhardt. Het opzet is niet alleen in, maar ook buiten Duitsland moderne en klassieke toneelwerken in het Esperanto voor het voetlicht te brengen. Wij hopen dat dit weldra mogelijk wordt. Belangstellenden kunnen nader ingelicht worden bij «Esperantista Teatro», Viktoriastr. 39 d, Lünen/Westfalen.

## ESPERANTO IN DUISLAND.

Het aantal Volkshogescholen dat Esperanto in hun leerplan hebben opgenomen is nu in Duitsland tot 95 gestegen. 66,5 procent der leden van de Landtag van Beieren hebben zich schriftelijk voor het Esperanto uitgesproken en 6.613.757 Duitsers hebben zich individueel of collectief tot de UNO gewend met het verzoek het onderwijs van Esperanto op de scholen aan te bevelen. Te Göttingen worden met Pinksteren duizenden esperantisten verwacht op het tweede naoorlogse congres van de Duitse Esperantistenbond. Het organiserend comité werkt met de gebruikelijke duitse «gründlichkeit» aan de organisatie van dit congres dat tot in de puntjes zal worden verzorgd: een nursery, een modern rijk der kleuters, zal de duitse moeders toelaten zonder kindverzorging aan het congres deel te nemen.

## STATISTISCHE GEGEVENS IN ESPERANTO.

Het Braziliaans Instituut voor Aardrijkskunde en Statistiek gebruikt sinds jaren Esperanto voor haar publicaties. Zo kwam onlangs onder de titel «Statistika Resumo pri Brazilo 1946» (Statistisch Résumé over Brazilië 1946) een lijvig boek van de pers dat in drie talen is gesteld: Portugees, Engels en Esperanto en een schat van gegevens bevat over de bedrijvigheid op allerhande gebied in 1946 van de grote Zuid-Amerikaanse republiek.

## IMMER HET TOKENSYSTEEM.

Wie zal ooit uitmaken de tol door het mensdom betaald en nog te betalen alleen aan het materieel elkanter-niet-kunnen-verstaan van de staatslieden? Het nefaste tolkensysteem is gewis mede oorzaak van misverstand, wrijving en wantrouwen. Generaal Eisenhower beweert in zijn «Mémoires» dat het eerste intergeallieerd contact te Berlijn geweldig werd bemoeilijkt door de verscheidenheid der talen. Het kwam van kwaad tot erger en nu is de Berlijnse kwestie de nachtmerrie van miljoenen mensen. En al hebben de taalmoeilijkheden hier niet alleen schuld aan, doch zijn ze mede verantwoordelijk voor de tot het uiterste gespannen verhoudingen. De esperantisten hebben tien miljoen petitjes verzameld opdat de UNO oog en oor zou krijgen voor het internationale talenprobleem. Laat ons hopen dat de UNO voldoende tijd zal vinden om naar de stem van tien miljoen mensen te luisteren...

De titel van deze rubriek spreekt voor zichzelf. Ik zou dus water naar de zee dragen, als ik U toch nog een en ander over het doel van deze rubriek zou vertellen. Toch wil ik, op gevaar af, vervelend te worden, enkele algemene opmerkingen maken, om deze rubriek bij U in te leiden.

De inhoud van *La Studanto* is bedoeld zowel voor beginners als gevorderden, die menen, er iets uit te kunnen op steken. Het is mijn voornemen, zoveel mogelijk eick wat wils te bieden en leer- en vertaalstof te geven, die ook op de clubavonden gebruikt kan worden. Graag wil ik daarbij zoveel mogelijk rekening houden met de verlangens van de lezers. Heeft men dus bijzondere wensen omtrent de inhoud of wil men een speciaal grammaticaal onderwerp behandeld zien, men schrome niet, ons met vragen lastig te vallen. Komt U in Uw leerboek of in de literatuur iets tegen, dat U niet duidelijk is, even een briefje, en de zaak komt voor elkaar... of niet, want ook wij zijn niet alwetend! Bedenk daarbij wel, dat de verschillende auteurs van leerboeken en literaire werken het over bepaalde grammaticale onderdelen niet helemaal eens zijn; dat wanneer mijnheer A. iets züs verklaart en mijnheer B. zó, dit nog niet betekent, dat óf mijnheer A. óf mijnheer B dwaalwegen bewandelt. Zolang over bepaalde onderdelen van de grammatica door de *Akademio de Esperanto* nog geen uitspraak is gedaan, zijn verschillende opvattingen mogelijk.

Schrik niet te gauw, als U Uw werk terug krijgt en tot de ontdekking komt, dat het verre van feilloos is. Ieder maakt fouten en vooral de beginnening. Was dat niet het geval, dan konden we met deze rubriek wel inpakken en de examencommissie met groot verlor naar huis sturen. Laat U dus niet ontmoedigen, maar ga na, welke fouten U gemaakt hebt en waarom Uw vertaling niet juist was, zodat U een tweede keer niet dezelfde fout maakt. Van onze fouten kunnen we leren: dat is juist de bedoeling. Een ezel stoot zich volgens het bekende spreekwoord niet tweemaal aan dezelfde steen. Waarom zouden wij het dan wel doen?

Deze rubriek is niet bestemd voor esperantisten, die al jaren meelopen in de beweging en diep beledigd zouden zijn, als ze niet voor volwaardige geestverwanten worden aangezien, maar toch welgemoed schrijven: «Estimatan Sinjoron! Mi havas ricevi via leteron, kiu mi havas legita kun multe intereso...» Deze *eternaj komencantoj* moeten, voorzover ze zich nog niet volleerd achten, hun licht maar elders opsteken.

Hoewel hier en daar wel rekening zal worden gehouden met de exameneisen en zo nu en dan fragmenten uit examenwerk in deze rubriek zullen worden opgenomen of besproken, zal deze rubriek niet opleiden voor een bepaald examen.

In verband met de beschikbare plaatsruime zal het niet steeds mogelijk zijn, van alle opgaven in een volgend nummer de uitwerkingen op te nemen en de bijgevoegde verklaringen zullen wel eens wat beknopt moeten zijn. Wie daarom de voorkeur geeft aan individuele correctie, kan zijn taak opsturen, die door ons van de nodige correcties en verklarende aantekeningen voorzien zal worden getourneerd, mits postzegel voor antwoord is bijgevoegd.

Inzendingen van Vlaamse cursisten vóór 20 Januari aan V.E.B. (Studanto), postbus 342, Brussel; voor Nederlandse cursisten vóór 20 Januari, aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam.

En nu dus maar aan de slag, want we beginnen dit nieuwe jaar, waarvoor ik U het allerbeste toewens, vol goede moed! Alle begin is moeilijk! Dat ondervond ook een «novbakita» esperantisto bij het schrijven van zijn eerste brief naar het buitenland en helemaal zonder fouten is zijn brief dan ook niet. Aan onze beginners de taak om die brief in onberispelijk Esperanto te kopiëren:

### KARA SAMIDEANO,

Mi havas legi vian anonco en la gazeton, en kiu vi skribis, ke vi deziris respondi kun eksterlandano. Mi ankoraŭ ne longa tempo estas esperantisto; tri monatojn pasinte mi komencis la studon kaj diligente daŭrigis studi ĝis nun. Pro ke mi estas studita nur dum mallongan tempon, mi certe faras multe erarojn en ĉi tiu leteron, kiu estas la unuan, kiu mi skribas en Esperanto. En la kurso mi ankaŭ faras erarojn, sed la instruisto korektas kun lia ruĝa kraĵono: eraroj, kiujn mi faras en mia taskoj. Mi estas 25 jarojn kaj laboras en fabrikejo, kie mi devas forte bati kun martelilo. Ĉu kion jarojn estas vi? Ĉu vi ankaŭ laboras en fabrikejo? Mi esperas, ke mi baldain estos sperta esperantisto, ĉar mi deziras fariĝi kurskvidanton kaj lerni aliajn homojn Esperantanto. Mi ne scias, aŭ vi povas kompreni mian leteron; mi esperas ke mi ne faris tre multaj da eraroj. Mi tre ĝojos min, kiam vi volos respondi al mi kaj esperas, ke

mi baldai ricevas letero de vi. Ĉu vi ankaŭ trovas Esperanto belan lingvon? Nun mi ĉesas la skribadon kaj kore salutas vin!

Hier volgen ter vertaling enkele zinnen, die speciaal bedoeld zijn voor hen, die hun leerboek doorgewerkt hebben en nu wel eens weten willen of de grammatica «er in zit». Ook aanstaande A-candidaten kunnen met deze taak hun voordeel doen.

1. Ik zou juist uitgaan, toen mijn kennis de kamer in kwam. 2. In de herfst rijpen de vruchten en maakt de wind de bomen kaal. 3. Uw werk en moeite zullen vruchteloos blijven, als ge U niet beter voorbereidt. 4. Hoe langer U gestudeerd hebt, des te beter zal het resultaat van Uw werk zijn. 5. Ik vroeg hem, of hij van plan was, zich voortaan beter te gedragen. 6. Hij heeft me beloofd, dat hij om tien uur hier zou zijn, om me z'n nieuwe boeken te laten zien. 7. Het heeft de hele nacht gesneeuwd. De gevallen sneeuw bereikte hier en daar een hoogte van een halve meter. 8. Onze hond is niet zo groot als die van U; de onze is veel kleiner. 9. Als ik hem niet beter kende, zou ik denken, dat hij loog. 10. Men noemt China het land van de ryzende zon. 11. De prijs van zijn boek is drie gulden; dat van zijn broer heeft het dubbele gekost. 12. Het is wenselijk, dat we de zinnen aandachtig lezen, alvorens ze te vertalen.

En nu iets voor de al iets meer gevorderden, nl. wat hutspot, waarbij het woordenboek wel eens te hulp zal moeten komen, maar... eerst zonder woordenboek proberen!

Geef de juiste Nederlandse vertaling van de volgende woorden:

Lama — pilgrimo — kvartalo — cirkelo — kripla — slimo — kordo — tamburo — punto — kankro — termino — komizo — arestanto — planko — tapeto — komisio — sorto — arbitro — krampon — kringo.

En nu iets moeilijker:

Vertaal (let op de juiste schrijfwijze):

President — avontuur — trompet — bankier — primula — parket — dirigent — republiek — cirkelproviand — exemplaar — korporaal — perceel — perkament — commentaar — vestibule — balans — clarinet — spontaan — reserveren — sulade — recensie — bankier — baviaan — mispel, reptiel — baret — Europeaan — bijet — ingrediënt — lariks.

Hier volgt een kort fragment uit *Martha* van E. Orzesko, vertaald door Dr. L. Zamenhof. De tekst is niet moeilijk en U zult de inhoud zeker begrijpen, maar... begrijpen en vertalen is twee! Probeert U het stukje eens in vlot Nederlands over te zetten?

Mario ne eraris, kiam ŝi havis la konvinkon, ke ŝia kuzo posedas bonan kordon, tial ŝi nun kun certa kontenteco akompanis lin per la okuloj ĝis la sojlo, poste ŝi turnis sin denove al Marta. La juna vidvino staris senmove, kun ankoraŭ pli ardanta ruĝo sur la vizaĝo. Ŝi ne povis ne vidi, ke ŝi vekis kompaton ne sole en ĉi tiu virino, kiu antaŭ momento premis ŝiajn manojn, sed ankaŭ en tiu juna homo, kiun ŝi preskaŭ tute ne konis, ĉar ŝi apenaŭ kelke da fojoj pasante lin vidis. Nun la unuan fojon en sia vivo ŝi estis objekto de homa kompato, ŝi preskaŭ mem ĝin elvokis, eviti ĝin aŭ forpuŝi ĝin ŝi, premata de fortega bezono, ne povis kaj tamen ĉi tiu sento, kiun oni montris al ŝi, sento per si mem bona, falis sur ŝian kapon kiel premeganta pezo kaj klinis ĝin malsupren...

Veel en aandachtig lezen is het middel, om zich correct in Esperanto te leren uitdrukken en zich een vlotte, internationale stijl eigen te maken. Al lezende kunnen we een schat van aardige zegswijzen en zinswendingen verzamelen waaruit we hier een greep doen.

Probeert U er eens een passend Nederlands equivalent voor te vinden?

1. Meti ĉion sur la karton. 2. Teni iun sub akvopana aresto. 3. Lasu min en paco! 4. La unua renkontita gastejo. 5. Fordormi sian ebriecon. 6. Li elbabilis la sekreton. 7. Ĉesu saĝumi! 8. Li falis el sitelo en barelon. 9. Pagi bonon por malbono. 10. Li surhavis malnovan kolorperdintan uniformon. 11. Li ree estis li mem. 12. Kun tio mi ne havas aferon. 13. Vorto donis vorton. 14. Kio aŭ vi farigis? 15. Li alpaŝis al esplorado de la afero. 16. Varioldifektita vizaĝo. 17. Li subtenis ŝian opinion. 18. Nia posedajo najbaras kun ilia. 19. Dum momento ŝiaj fortoj strikis. 20. Kunĉeniĝo de la cirkonstancoj. 21. Kvarpedule rampi. 22. La mastro klopode eliris por prepari la manĝaĵon. 23. Granda ĉagreĉo ekposedis lin.

## Poŝtmarka tago en Hungarujo

Jam en 1947, okaze de la poŝtmarka Tago (21.XII), la Federacio de la hungaraj Filatelistaj Asocioj eldonis poŝtkarton, kies bildo trafe similis al tiu de la speciala poŝtmarko (poŝtveturilo); la poŝtstampo estis en hungara kaj franca lingvoj — la surskriboj de la karto en lingvoj hungara, franca kaj esperanta: POSTMARKA TAGO.

La 17.X.1948, tuta Hungarujo denove festis la poŝtmarkan tagon per eldono de belega turkis-blua 30 fil. p.m. kaj la Filatelia Federacio presigis tre plaĉan maksimuman karton (kolombo portanta leteron en beko ĉirkaŭflugas la terglobon) kaj memorigan sambildan koverton. Vertikale elipsa poŝtstampo estis en hungara kaj franca lingvoj. La surskriboj de l' karto kaj de l' koverto ree estis en tri lingvoj, i.a. en Esperanto.

Jen filatelaj memorajoj, kiujn deziros akiri ĉiuj esperantistaj kolektemuloj, sed ili rapide, se ne jam malfruas.

G. Saget

## Esperanto in England

Gedurende bijna 39 jaar heeft in de St. Barnabaskerk, Plimlico Road, Londen S. W. de tweede Zondag van elke maand een Esperanto-godsdienstoefening plaats gehad.

De Paas-conferentie van de International Friendship League te York was eenstemmig van mening, dat «de Britse sectie het wenselijk acht, alle documenten die Internationale Conferenties of het Internationale Comité gebruiken, behalve in een nationale taal, ook in het Esperanto verschijnen.

## Verbetering van Oefening 41.

Jen la originalo:

Tragedieto.

Sur telefono-drato, proksime al mia malfermita fenestro, sidas kolibrino. En sia beko ŝi tenas grandan molan plumon de blanka kokino. La kolibroj estas birdoj malgrandaj, la kokina plumo estas tiel granda kiel la kolibrino. Malhele verda kun flava brusto, ŝi estas bela birdeto, kaj en ĉi tiu momento tre fiera kaj kontenta.

Ĉar jen efektive bona trovajo, bonega por la konstruata nesto! Tial ŝi ne inklinas tuj demeti ĝin tien; antaŭe konvenas iom da fanfara paradado al la adreso de la edzo, kiu sidas apude sur la sama drato.

Birdmaniere ŝi diras: «Rigardu, mia kara! Do vi ne rimarkis ĉi tiun valoregan plumon, ĝuste tian, kian ni bezonas por la hejmo?»

La edzo admiras, gratulas kaj kompleze konsentas pri sia malsupera inteligento: «Efektive, mia kara, vi estas ĉarma, kaj kiel lerta!»

Sed vento ekblovas, kaj la blanka plumo, forbloviginte el la beko de la kolibrino, falas sur mian skribotablon mem, kaj de tie la birdetoj ne kuraĝas ĝin repreni.

Ho ve, la tre havinda plumo perdiĝis! La gekolibroj malĝoje forflugas... La kolibro ŝajnis edzo diskrete, supozeble li ne faros ian komenton pri ĉi tiu malfeliĉa okazaĵo.

Moralo: Ne malŝparu tempon, fanfaronante kaj vin admirante, sed agu!

(R. F. Vaughan)

## De Redactie antwoordt.

Over oefening 40 (Nov.-nr.)

1) «Als de barre Winter zijn ruwe aanval op de planten doet»: hier bracht de woordelijke vertaling een lelijke verassing: «Kiam la severa vintro (bij verpersoonlijking met een hoofdletter) faras ĝian(!) atakon sur la plantoj»(!), als het zo eenvoudig kon: «...krude atakas la plantojn».

2) «...forblovas per sia spiro»: noch «kun», noch «ĝia», want de Winter blaast het groen door middel van zijn eigen adem weg.

3) «...kaj ĉion kovras»; «...kaj kovras ĉion»: waar het woord «ĉion» ook geplaatst worde, het krijgt de «n», als bepaling-zonder-voorzetsel.

4) de grond van de heide wordt hier als teelgrond aangezien; daarom is «grundo» boven «tero» te verkiezen.

5) «...ne toleras nenium alian arbon» is een dubbele ontkenning, en dus fout: «...ne toleras alian arbon».

Aan V.E.B., Gent: 1) «Pino» volstaat; 2) «sendifekta» of «nedifektita»; 3) ŝajne mortinta vegetaĵaro: ĝi vivis kaj mortis. Zie ook nog de algemene opmerkingen. — Toegekende punten: 8.

Aan L.V.d.P., Gent: 1) barre Winter betekent hier niet «blote Winter»; 2) (for) sekigi; 3) ŝajne mortinta vegetaĵaro (niet: plantmondo). Zie ook nog de algemene opmerkingen. — Toegekende punten: 7.

De overige «studantoj» kregen hun verbeterde taak met persoonlijke nota's terug.

Al S.P., Blankenberge, ni ajn sincerajn gratulojn, pro akiro de la premio-kupon.



**HALTU LA FOLIFALO !**

Unu el niaj kunfratoj *prave* skribis ke la amplekso de la nacia gazetaro indikas la kulturalan nivelon de popolo.

Prave: ĉar se ni konsideras la historion kaj ĝian konstantan evoluon al plia homeco, al plia scienco, al plia komforto (kaj ĉu ne estas tio kion oni nomas civilizacio?), ni konstatas ke la homo faris unuan grandan paŝon kiam li malkovris la paperon kaj duan kiam li eltrovis la sekreton de la presado. Tiuj du inventaĵoj ebligis la kapturnigan kuradon al la progreso, kiu faras nian vivon pli agrabla, pli vivinda. Tute escepte la homaro ne forĝis la originon, la kialon de tiu antaŭeniĝo. Ĝi «manĝas» ĉiam pli da papero, kovrita per nigrinaj literoj.

Ju pli popolo partoprenas en tiu giganta kaj stranga festeno, des pli bone ĝi estas informata pri la progreso, des pli akurate ĝi sekvas la antaŭeniraĵojn, des pli efike ĝi servas ilin! La nomo de tiu popolo iĝas *impona*.

\*\*\*

Ĉio ĉi estas tro evidenta por ke ni insistu. Tamen, ĉe la komenco de nova jaro, kiam la gazetoj esperas enkasigi novajn abonpagojn, eble ne estas vane konsideri, en rapidaj strekoj, la situacion de nia gazetaro.

La kvanto de esperantistaj gazetoj kaj revuoj sendube estas granda, sed ĉu same taŭgas ilia kvalito, ilia prezentado?

Ho ve! Dum ni fieras pri internaciaj gazetoj kaj revuoj, kiaj *Heroldo* aŭ *Literatura Mondo*, aŭ pri naciaj kiaj *Amerika Esperantisto* aŭ *La Ponto* (ni nun citas tiujn pri kiuj ni tuj pensas, ĉar ni plej ofte havas ilin en la manoj), kiam da etaj presaĵoj, kiujn ni ofte ŝatas pro ekstera kialo sed kiujn ni ne povas nomi gazetoj!

Kompreneble ili prezentas plej diversajn senkulpigojn. Cetere, sian malgrandecon ili konsideras nur provizora. La sperto tamen montris kiel naiva estas tiu espero...

Neniu preteksto pravigas la dividon de fortoj kaj financaj rimedoj. Neniu absolvas tiun, kiu ellogas monon por gazeto ne vivokapabla kaj ofte malbone redaktata dum, pro nesufiĉa subteno, vivetas gazetoj gravaj, konataj, kies nomo jam nun estas signifa en Esperantujo kaj morgaŭ signifus ion en la mondo, se ili havus pli vastan legantaron.

Ĉu niaj samideanoj do ne scias ke gazeto aperanta je kvin mil ekzempleroj elspezas eĉ ne la duoblon de la kostoj de samampleksa gazeto kun eidonkvanto de nur unu milo?

Versajne ili ne scias, ĉar ili nenion faras por malhelpi la falon de la folioj. Tiun malsanon oni nomas kun teruro en la ĵurnalismaj medioj. «La morto de gazeto estas preskaŭ tiel malgaja kiel morto de homo», diris *Clement Vautel*. Tiun malgajecon ni, en Esperantujo, ofte sentas, ĉar la folifalo okazas ne nur en la aŭtunaj monatoj!

La plej freŝdata morto, (espereble provizora) estas tiu de *Espero Katolika*. Sed la sama sezono alportis al ni du novajn «revuojn». La unua estas *Aŭstra Esperantisto*, kiu volas propagandi nian aferon en oficialaj medioj! Sed ĝia aspekto estas mizera kaj ni timas ke ĝi... malpropagandos. La dua nomiĝas «*Ĵurnalistoj*», ĉar ĝi estas organo de TEJA: superega ironio!

Vere, malgraŭ la respekto kaj honoro kiun ni ŝuldas al Samideanoj Hugo Steiner kaj Richard Nielsen, pro ĉio kion ili realigis en nia Movado, ni senhezite konfesas ke, el pure praktika vidpunkto, ni estus preferintaj pluvivadon de *Espero Katolika* kaj aborton de la du novaj presaĵoj.

Ni diras tion sen ia konscienciproĉo, ĉar ni mem defendis la rolon de la malgrandaj revuoj. Sed jam tiam ni petis ke ili estu modestaj. Nu, evidentigas ke plejparte ili ne estas tiaj kaj, en tiuj kondiĉoj, ili simple ne havas utilon, ili eĉ malutilas kaj do formalaperu, por lasi pliajn vivpovojn al la gazetoj kies bonfara agado konstante progresigas la Movadon.

\*\*\*

Nur el entrepreno, aktiva, sperta, regule vivokapabla, povos iam kreski tiu taggazeto, kiun ĉiuj praktikaj samideanoj arde deziras, sed kiu ankoraŭ nuntempe, post pluraj klopodoj, restas fora revo. Ĝia realigo eĉ pli malproksimiĝis, de post 1936. Necesis naivega senbrida entuziasmo por ke *Carl Franzmann* kaj *Irène Fink* audacu, lastan fazon, fari klopodojn por ekkomenci ĝian realigon. El tiu penado naskiĝis «*La Granda Familio*»; ni certe ne ĉiam konsentis kun ĝia sinteno, kun ĝiaj iniciatoj, sed ili gajnis, malgraŭ multaj kontraŭstaroj en nia propra menso, nian simpatian, ĉar ĝi eble enhavis la grandan sekreton de la sukceso sur tiu tereno.

\*\*\*

Nun, por fini, ni konkludu pri la hodiaŭaj taskoj de la legantoj. Unue estas plej necese ke ĉiu samideano abonu almenaŭ unu gazeton. Estas multegaj kiuj ne -aŭ ne plu- faras tion, pro plej diversaj kialoj. ĝenerale nur

**XIV-a Kongreso FL.L.E. GENT, 4-6 de junio 1949**

TRIA KOMUNIKO

La konsisto de la *Komitato*: Ges-anoj Drs *Mortelmans, Van Neste, Terrijn, D'Hainaut, Van Haller kaj De Boes*. Skribu al: S-ano *De Boes*, Clementinalaan 31.

Pagu al: S-ano *Van Halter*; St. Michielsplein 8 — Postĉekkonto, n° 4832.56. Kongreskotizo: 50 Fr. po persono. Ni insiste petas ke tre multaj jam nun faru la ĝiron al S-ano *Van Halter*.

*Glumarkoj kongresaj*: ili estas haveblaj je 20 Fr. por 100. Nepre menu tu kvanton: vi propagandu Esperanton, gluante ilin sur viajn korespondaĵojn; vi konigu nian kongreson kaj... subtenu la laboron de la O.K., plenigante ĝian kason!

**GENT, MULTCENTJARA FLORURBO**

Sian famon tiurilate *Gent* ŝuldas precipe al la *Floralioj*.

Kiam ĉi tiuj okazas regas, en la *gentaj* Parko kaj Festpalaco, la Florekspozicio, kie kulturistoj kaj amatoroj prezentas



Malgranda Beginejo.

al la publiko siajn plej belajn plantojn kaj florojn, ĉefe la azaleon; tiam, la granda halo de la Festpalaco estas nura, grandega, floranta ĝardeno de azaleoj.

Ĉi tiuj estas kulturataj en la *genta* ĉirkaŭaĵo en miloj da varmkulturejoj. La unua tia vitra «varmdomo» estis konstruata en 1598, laŭ la projekto de tiama *genta* skabeno, *Willem de Blasere*. Post li, Episkopo *Triest* aranĝis en 1622 grandan bienon en la kvartalo *Akkergem*, kie ĝi estis konata kiel *Belvedere*: en ĝi oni kulturis ĉiujn specialaĵojn, ĝis tiam konatajn.

Alia speciala *genta* kulturo estas la begonio. Samkiel en *Nederlando* la tulipkaj hiacintkampoj estas printempe vizitindaj, la multkoloraj kaj multvariaj begoni-kampoj aŭtune logas multajn vizitantojn al *Gent*.

La gildo de S.a *Doroteo*, kiu starigis en 1687, de tiam estis la societo de kulturistoj kaj amatoroj kiuj sin okupas pri ĉiaj florkulturaĵoj.

**Hoekje van de Penningmeester**



Dit nummer is het eerste van het bondsjaar 1949. De twaalf voorbije maanden waren, uit alle oogpunten, verheugend voor onze organisatie. Wij zijn derhalve overtuigd van de trouw onzer leden, die zonder verwijl hun bijdrage zullen regelen, hetzij door de afdelingen, hetzij rechtstreeks, wat betreft de alleenstaanden, door storting op P.C.R. 2321.50, V.E.B. Brussel; die bijdragen belopen: 75 Fr.; INWONENDE leden betalen slechts 25 Fr., STEUNENDE leden, minimum 150 Fr.

Wie het volgend nummer F.E. wenst te ontvangen, betale onmiddellijk!

Met de inning door de post wordt aangevangen: onze leden zullen ons bereidwillig dit werk besparen!

Losse nummers voor boekhandel, propaganda e.d. dienen besteld bij de Penningmeester, V.E.B. Postbus, 342 Brussel (P.c.r. — 232150).

**Kvara Listo**

- MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1949.  
15. Drs. Roose F. Brugge. fr. 150  
16. F-ino Terrijn. Gent fr. 150

pretekstoj.

Due, ni abonu kaj propagandu nur tiujn gazetojn «kiuj efektive meritas nian daŭran subtenon», en la senco kiun ni supre donis al tiuj vortoj.

Se ĉiu agas tiel, versajne mortos pluraj multobligataj revuoj. Tia folifalo tamen neniel impresos nin, ĉar la duone sekaj folioj ne plu utilas al arbo.

F. PIOT.

**Wereldnieuws**

\* BRAZILIE. Voor de ambtenaren van het departement Statistiek van de staat *Santa Catarina* zijn bij decreet officieel Esperanto-cursussen ingesteld.

\* CANADA. Aan de universiteit in Toronto wordt een Esperanto-conversatiecursus gegeven.

\* CHINA. Zelfs in dit rampzalige land wint Esperanto weer veld: In Foochow, de hoofdstad van de provincie Fukien, geeft het dagblad *Fugien Shbao* een 14-daagse Esperanto-rubriek.

\* CUBA. Bij beschikking van de Minister van Onderwijs vond ook in 1948 aan de universiteit van Havana weer een E.-cursus plaats van 5 Juli tot 14 Augustus (5 lessen per week).

Het radiation C.M.Z. zendt tweemaal per week een cursusles uit van 15 minuten.

\* DUITSLAND. In Hamburg melden zich 154 politie-dienaren aan voor een E.-cursus in de politie-school aldaar.

De gemeenteraad van Berlijn heeft besloten het E. als facultatief vak op de volksscholen in te voeren.

In Kiel is het E. ingevoerd op een middelbare school.

Het Ministerie van Volksontwikkeling in Sleeswijk-Holstein heeft zijn toestemming gegeven tot de onmiddellijke invoering van het E. als niet-verplicht vak. De plaatselijke onderwijs-autoriteiten in München hebben hun goedkeuring gehecht aan de invoering van het E. op de volks-, hogere en handescholen.

Aan de kweekschool voor onderwijzers te Bamberg vinden 5 E.-cursussen plaats waaraan 100 leerlingen deelnemen. Aan het Katholiek Seminarium voor geestelijken in dezelfde plaats is er ook een E.-cursus; de hogeschool voor filologie en theologie aldaar zet het volgende studiejaar de daar gegeven E.-cursus voort.

Het Ministerie van Onderwijs in Beieren heeft goed gevonden dat het E. facultatief wordt onderwezen in de hogere scholen (*Höhere Schulen*).

*La Ponto*, orgaan van de *Duitse Esperanto-Bond* vertelt, dat het percentage van de afgevaardigden van de *Beierse Landdag*, dat zich schriftelijk voor Esperanto heeft uitgesproken, nu gestegen is tot 66,5.

\* FINLAND. «*Esperanta Finnlando*» schrijft in het nummer van Mei 1948: De chef van de afdeling Volksonderwijs van het Ministerie van Onderwijs deelt ons mede dat zijn afdeling het leren van Esperanto reeds lang een ernstige en nuttige zaak acht en dat deze de opnemng ervan als vrij vak in het programma van de volksschool op geen enkele wijze wenst te beperken. Volgens de wet kan in de twee hoogste leerjaren maximaal 2 u. per week een vrij vak worden onderwezen met goedkeuring van het plaatselijk schoolbestuur en de inspecteur. Als zodanig kan overal E. worden ingevoerd. De eis van genoemde goedkeuring bedoelt te voorkomen, dat iemand een vak zou onderwijzen, waarin hij niet bekwaam is en kan de invoering van E. op geen enkele wijze bemoeilijken. Persoonlijk hoopt hij, dat zoveel mogelijk onderwijzers de mogelijkheid zullen benutten zodoende hun leerlingen iets te leren, dat hun horizon zal verwijden en gelegenheid zal geven tot persoonlijk contact met buitenlanders, wat zonder E. voor het merendeel der leerlingen van de volksschool onbereikbaar is.

**ANONCETOJ**

A. *Lodema* kaj edzino deziras al ĉiuj siaj geamikoj Esperantistaj, feliĉan kaj prosperplenan Novjaron (Amsterdam, I. 1.49)

W. SCHILLING, 15-jara drogist - lernanto, Frauenlobstr. 72, Mainz/Rhein, Germanujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Gesamideanoj 18/40-jaraj deziras korespondi pri diversaj temoj. Ili ankaŭ interŝansas poŝtmarkojn. Skribu al: *Georg Huther*, (13-a) *Miltenberg/Main* von Hauckstr. 8 — Bavario — Germanujo.

**LA INTERLIGILO**

46 rue Lamartine  
Paris IX Francio  
plene eldonita  
en Esperanto  
de 1922  
interesa  
sperta  
revuo  
tutmonda  
Interligileco  
Poŝto. Filatelio  
Telekomunikado  
Fervojoj k. Trafiko  
Aviado. Ŝoseoj. Maro  
TUJ PETU SPECIMENON  
Cautlaert J. L. M.  
Uitbreidingstr. 654  
Berchem-Antwerpen

**RAPORTO PRI LA LAŬSTATUTA ĜENERALA KUNVENO DE FL.L.E.**

Brussel, 21.XI.48.

Pro la fakto ke la antaŭtagmeza estrarkunveno postulis pli da tempo ol antaŭvidite, la liga prezidanto, D.ro T. *Van Gindertaelen*, kun duonhora prokrasto malfermis la ĝeneralan kunvenon je la 14.30-a. Li bonvensalutis multnombrian publikon, inter kiu estis sekciaj delegitoj, lokaj reprezentantoj aŭ simplaj liganoj el *Aalst, Antwerpen, Blankenberge, Brugge, Brussel, Gent, Kortrijk, Mechelen, Leuven, St. Pieters-Leeuw*.

Sro *Gr. Maertens*, liga sekretario, koncize raportis pri nia konsiderinda laboro dum la finiginta jaro. Pri la financaj raportis la liga kasisto Sro A. *De Keijzer*.

La kunveno funde pritraktis niajn rilatojn kun U.E.A.: ĉar elekto de ĉefdelegito ne okazis, ĝi decidis fari konkretan proponon pri la postenoj de ĉef- kaj vicĉefdelegitoj kaj pri la preciza konsisto de iliaj respektivaj funkcioj kaj rilatoj, speciale koncerne la nomigon de delegitoj; Dro *Couwenberg* estis indikita kiel nuna peranto FL.L.E. Se la afero ne enordigus, la estraro FL.L.E. kaj la ĝenerala kunveno decidis eventuale apelacii la UEA-komitaton, por atingi finŝolvon.

La Liga Prezidanto raportis pri la intencita laboro inter la nederlanda esperantista asocio LEEN kaj FL.L.E.; la kunveno unuanime aprobis la preparlaboron de la koncerna komisiono kaj same unuanime sankciis la koncernen kontrakton. Ĝi aprobis ankaŭ la kontrakton, laŭ kiu komuna organizado de somera feria kursosemajno estas decidita en *Kerk-Avezaath* (Nederlando) por 1949. Niaj geanoj nepre kaj multope partoprenu ĝin.

**UEA-Kotizoj**

- MJ = Membroj kun *Jarlibro* (Membrokarto, servokuponaro, *jarlibro*): 45.— Fr.
  - MA = Membro-Abonanto (la samaj kun oficiala gazeto Esperanto): 112.— Fr.
  - MS = Membro-Subtenanto: (la samaj, sed pagas pli por finance helpi): 225.— Fr.
  - Patr. = Patrono (la samaj, sed pagas dekoblan kotizon): 1.120.— Fr.
- Aktive kunlaboru kun UEA!  
Pagu al:  
P.C.K. Nr. 4161.35  
de Dro *Couwenberg*,  
*Koninginnelaan, 14, Blankenberge*.

La kunveno poste decidis lasi senŝanĝaj la FL.L.E.-kotizojn por 1949. Pri la lastokazinta FL.L.E.-kongreso, ĝi aŭdis la raporton, prezentitan de Dro *Couwenberg*; la Liga Prezidanto dankis lin pro la bonega laboro kaj la financa rezultato kiujn la kunveno unuanime aprobis.

Nome de la organiza komitato de nia venonta kongreso, F-ino J. *Terrijn* donis kelkajn klarigojn. Ŝi montris la desegnaĵojn de la kongresglumarko kaj instigis la ĉeestantojn vaste uzi tiun propagandilon. Ŝi insiste alvokis por senprokrasta enskribo. Nia venonta kongreso estu inda de ĉiuj antaŭaj!

Okazis la laŭstatuta ekŝigo de la duono de la estaranoj, kiuj tamen restis reelekteblaj. Ĉar krom la prezidanto ĉiuj estaranoj pretis reokupi la saman estraran postenon, la kunveno unuanime reakceptis iln. Ĉar por la posteno de liga prezidanto estis neniuj kandidato D.ro T. *van Gindertaelen* finfine kaj post diversflanka instigo reakceptis la prezidantecon kondiĉe ke, almenaŭ provizore, vicprezidanto Drs *Roose* anstataŭu lin por plenumi la efektivan laboron.

La liga sekretario poste komunikis planon por la varbado de membroj kaj amikoj kaj proponis varbkonkurson kiun, kun eta modifo, la kunveno akceptis.

Sekvis ronddemando kaj pritrakto de diversaj. Iom post la 18-a okazis la fermo de la kunveno, dum kiu ĉiu ĉeestanto montris varman intereson por la vivo kaj kresko de nia *Flandra Ligo Esperantista*.

Dum la paŭzo la ĉeestantoj povis viziti la interesan librorstandon kiun, kiel kutime, *Flandra Esperanto-Instituto* aranĝis en la salono.



# Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

## BESTE LEZER,

Ook het Puzzle-boekje biedt u zijn oprechte wensen aan voor het nieuwe jaar. En het hoopt u weldra allemaal onder zijn trouwe oplosers te mogen rekenen.

Onze bedoeling blijft als voorheen: u om de maand een spannend uurtje van verzet te bezorgen, dat tevens uw vaardige kennis van het Esperanto ten goede komt. Het wil uw woordenschat uitbreiden of oprispen, vaak omliggende begrippen verscherpen, u in contact houden met de literatuur van het Esperanto, met de geschiedenis van zijn Beweging.

Ieder vindt hier wel wat naar zijn gading: eenvoudige puzzels voor de nieuwelingen, naast enigszins lastigere voor deze die de knepen al weghebben. Wat aandacht, wat geduld, en methodische controle aan de hand van betrouwbare bronnen: meer is er niet nodig om de juiste oplossing te vinden en na een tijdje de premie weg te kapen.

Hier volgen de REGELS van het spel, voorbehouden aan de leden van de Vlaamse Esperantistenbond, aan de leden van L.E.E.N. en aan de abonnees van Nederlanda Esperantisto.

1. Voor elke juiste oplossing worden 5 punten toegekend. Voor een ongeveer goede gaat wellicht nog niet alles verloren.

2. Om de maand worden 2 premies gegeven aan de oplosers met het grootste aantal punten: één aan een lid van V.E.B., één aan een lid van L.E.E.N. Als overgangsbepaling geldt, dat de premie voor L.E.E.N.-leden pas over drie maanden geregeld zal toegekend worden.

De V.E.B.-winnaar verkrijgt aldus het recht voor een bedrag van 50 fr. boeken te bestellen bij Flandra Instituto; de L.E.E.N.-winnaar mag voor f 3.— bestellen bij Boekendienst L.E.E.N.

3. Hun puntenaantal valt terug op 0, evenals dit van de deelnemers die in de loop van 12 achtereenvolgende maanden geen oplossing instuurden. Ondertussen behouden of verbeteren de anderen hun stand.

4. Nederlandse esperantisten sturen hun oplossing tijdig naar s-to Teunissen, Legmeerstr., 37 A, 1, Amsterdam-West.

Voor de V.E.B.-ors blijft het vroegere adres: POSTBUS 342 (Enigmoj), BRUSSEL.

### LET OP:

1. Definities met (R) doelen op woorden zonder de grammaticale uitgangen A.E.I.O. Dat belet echter niet dat het woord afgeleid of samengesteld mag zijn.

2. In kruisende woorden van een kruiswoordraadsel worden „u“ en „ü“ als gelijkwaardig beschouwd.

3. Elke gebruikte wortel staat opgegeven of in het Woordenboek VAN STRAATEN, of in PLENA VORTARO DE ESPERANTO (Grosjean-Maupin).

4. Namen die betrekking hebben op de Beweging of op de Esperanto literatuur worden vermeld bij:

ISBRUCKER: Historio kaj Organizo de la Esp.-Movado.

DEGENKAMP: Esperanto 60-jara.

Ziezo, BESTE LEZER: u mag beginnen, het succes staat met ongeduld op u te wachten.

La PREMION (F.L.E.E.) gajnis post n-roj 51-52: s-ano L. Vandepitte, el Gent.

### SOLVOJ.

N-ro 53.

1. Paroloj kaj faroj estas malsamaj aferoj. (842). — 2. Pri la lupo rakonto kaj la lupo renkonte. (586). — 3. Kiu rompis la glason, ordigu la kason. (1053). — 4. Kiu mem sin gloras, malbone odoras. (1216). — 5. Al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras. (590).


N-ro 54

HOR. 2. anstataŭgi. — 4. akaci; atest. — 5. fer; nul. — 6. palm. — 7. BAGHY JULIO. — 8. lu; panj. — 9. torpedi. — 10. pont; lulilo. — 11. ord; akn; nep.

VERT. 1. malafabl; po. — 2. ke; aŭtor. — 3. asparag; ond. — 4. hirt. — 5. kazin. — 6. ul, uj, um; selk. — 7. batal; dun. — 8. pupil. — 9. liberala; in. — 10. linoleo. — 11. VIKTIMOJ; op.

N-ro 55. KRUCVORTENIGMO.

HORIZONTALE. 2. ĝi kaptas muŝojn (R); malgravaĵo (R). — 3. oni uzas ĝin por glui (R). — 4. havigi al si per mono; ne plenkreskinta homido (R). — 5. prepozicio; persona pronomo. — 6. Korrespondante oni ofte uzas ĝin. — 7. antaŭenirigi ion rondan (R). — 8. proponi trinkon por honoro iun (R); prilabori paston (R). — 9. koloro (R). — 10. kapabla facile kaj bone fari ion; granda glando en la ventro. — 11. insektoj faras tion.



VERTIKALE. 1. solena armea revuo (R); funde sensprita (R). — 2. kapvesto (R). — 3. senrezulte; atente rigardi (R). — 5. skribi en tiucela libro notojn kiujn oni volas konservi (R); fundamenta principo (R). — 6. pulvorigi grenon (R). — 7. ŝiparestro (R); arbo (R). — 9. el ĝi oni faras vestojn (R); deci (R). — 10. membro. — 11. fleksi malsupren; malsagegulo (R).

N-ro 56: KRUCVORTENIGMO.

(laŭ la krado de n-ro 55.)

HORIZONTALE. 2. fantaziĵo (R). — 3. nombro. — 4. karakteriĵo (R); insektoj sučas per ĝi (R). — 5. sufikso (R). — 6. li vendas ĥemialojn (R). — 7. sufikso (R). — 8. senakvigigi (R); rapide movigi tien kaj reen (R). — 9. vegetaĵo (R). — 10. ĝi estigas dum malvarmaj noktoj (R); antaŭsciigi (R). — 11. oni sidas sur ĝi (R).

VERTIKALE. 1. nemovebla; alproprigi al si (R). — 2. prepozicio. — 3. ĝoje akلامي (R); fari (R). — 5. favora inklino (R); kurba tenilo (R). — 6. mastro (R). — 7. ne vertikale starante (R); tien knabinoj ŝatas iri (R). — 9. difini la valoron (R). — 10. nenio mankas al ĝi (R). — 11. forta ventego (R); plaĉa per bele proporciaj formoj (R).

Sendu la solvojn antaŭ la 20-1-1949: anoj de LEEN kaj abonantoj NE: al s-ro Teunissen, Legmeerstr. 37 A, 1., Amsterdam-West.; anoj de F.L.E.E.: al POSTBUS 342 (Enigmoj, BRUSSEL.

# Plaatselijk Nieuws KOMUNIKOJ de la ESTRARO

## Varbu VI!

Post jaro, plena de sukcesa organizado interna, ni planu jaron, post kiu ni rajte fieru pri granda kresko de nia membraro!

Ni scias: tro multaj flandraj esperantistoj ne apartenas al nacia organizaĵo. Do, ni kaj vi nepre konvinku ilin!

Legante la suban regularon pri nia varbkonkurso 1949, vi facile konstato ke la estraro malavare disdonos premiojn, ne nur al kiuj grandskale varbos, sed ankaŭ al kiuj akiros modestajn rezultatojn.

### REGULARO

1. Rajtas partopreni, ĉiuj ligaj membroj kaj ĉiuj sekcioj F.L.E.E.

2. Po varbita «amiko» (15 aŭ 25 fr.), la varbitinto ricevos 1 poenton; po varbita membro (75 aŭ 150 fr.) aŭ eksterlanda abono, 5 poentojn.

3. La poent-kalkulo okazos jene: la liga kasisto notu ĉiujn mendojn de atestoj por amikoj je la nomo de la sekcio aŭ de la mendanto; poste la sekcioj faru liston, menciante la poentojn po sekciano; la liga kasisto notu 5 poentojn, kiam li enspezos pagon por nova membro — t.e. por iu, kiu ne estis membro en 1948. Sur la listo oni bonvolu indiki: Varbkonkurso—varbanto (nomo kaj loko).

4. La konkurso komenciĝas la 15-an de novembro 1948 kaj finiĝas la 30-an de aprilo 1949.

5. La premio-listo estos baldaŭ publikita; ni jam anoncu ke:

a) la sekcio, kies sekcianoj sume atingos la plej grandan poentnombrom, ricevos valoran premion.

b) 15 premioj estos donacataj al la membroj, kiuj atingos la dekkvun plej altajn poentnombrojn. La tri unuaj jam estas fiksitaj (tamen la unua plenumiĝos, nur se la unua individua premio — aŭ pli ĝuste la meritinto — akiros minimume 60 poentojn):

1) senpaga vojaĝo kaj restado en Keik-Avezaath (Nederlanda), kie okazos la unuaj feriaz kursoj organizitaj kunlaboro de LEEN kaj F.L.E.E. (fine de julio 1949).

2) senpaga vojaĝo kaj restado en la 14-a kongreso de F.L.E.E. en Gent, dum la pentekostaj tagoj 1949.

3) Jarabono Esperanto (UEA) aŭ Herolde.

Bonan sukceson!

1949 SUKCESA JARO!  
TIAL,  
VARBU POR VEB!  
LIBROJN MENDU ĈE V.E.I.!

## TRIA PARTO (13) VIVANTA LINGVO

« Rigardu en la lingvon, vi tie vidos kiel en spegulo la vizaĝon de la popolo parolanta... »

Post longeta vojaĝo tra antikvaj landoj, rasoj, primitivaj formoj kaj oficialaj dokumentoj, libroj kaj pedantaroj, ni adiaŭas la lingvon de presitaĵoj. Ni eniras nun vivantan lingvon, kiun buŝe kaj letere uzas niaj fervoraj samideanoj, flue parolantaj. Ili ignoras la rigidan severecon de gramatikoj, kaj en la flamo de diskutoj, ili senvole kreas mirinde simplajn novaĵojn, perlojn de nia estonta lingvo.

Oni neniam sufiĉe pripensas, kiom granda estas la influo de ofta buŝa uzado, per kiu la lingvo burĝonas, disfloras, fluigas vivantaj suktoj. Kaj por tiu miraklo sufiĉas nur reala uzado, nur ofta uzado de la lingvo.

Ju pli ofte ripetigas iu multvorta esprimo, des pli rapide aperos emo ĝin mallongigi, por ne perdi sentute la tempon. En magazeno, kie oni vendas nur vinon, vi ne aŭdos: ĉampana vino, bordoa vino, makona vino... estus absurde ripeti tion kio evidentas sen vortoj, — oni do diras simple: dek bordoa, cent makona, tridek ĉampana, k.a. Inter samideanoj, kiuj parolas tuttage, komune laborante, oni rapide kutimiĝas diri: kiomas? — anstataŭ «kioma horo estas», kaj oni nature respondas: «kvara» aŭ «kvaras...» (estas la kvara horo posttagmeze). Post centfoje ripetado «ĝis la revido», «ĝis la revido» oni nature diras «ĝis la» (inter kolegoj). Male, kongresano, kiu unufoje en sia vivo Esperante parolas, salutas komplete «bonan tagon, sinjoro», «ĝis la revido, sinjoro» kaj al li eĉ ŝajnas maldeca la maniero: «bontag», «salut», «ĝis...»

Se tri samideanoj, franco, hungaro kaj sviso, sendepende unu de alia, instinkte diris: ĉui anstataŭ «demandi», ili nur obeas al la instinkto tuthomara, kiu ekkaptas ripetadojn, por krei novan formon. Aŭdinte serion da frazoj: ĉu vi scias... ĉu li venis... ĉu ni iru... k.m.a., oni nature emas igi la komencan vorteton: «Vi ĉias min... Li min ĉuis...» Same oni diris pri oratoro, kiu en sia parolado ofte uzas la vorton «ne», ke li «neas». Al kabinetulo, kiu ne vidas kaj ne aŭdas vivantaj homojn, tiaj formoj ŝajnas arbitre kreitaj, «elpensitaj». Sed la reala vivo superas ĉiujn romanojn je sia fantazia kreado. La vivo buŝa kaj libera uzado de Esperanto ĝisfunde eluzas la lingvon, knedante la formojn por la bezono de la momento, perfekte adaptigante la lingverojn al la penso direkta. Tiel, en la viva

## DEVENO & VIVO DE LA LINGVO ESPERANTO

originale verkis: Petro Stojan

parolo naskiĝas kaj forpasas centoj da kombinaĵoj, nenie skribitaj, eble neniam enregistrotaj. Mizere aspektas apude la nurlibra scio de la «klasika» lingvo, kiu ekzistas tiom, kiom iu iam verkis, presigis aŭ oficialigis rigide fiksitajn formojn. Se la unua samideano rolas kiel viva kreanto, la dua funkcias kiel maŝina fonografo, kiu povas nur imiti, ripeti, reprodukti alies parolojn, sed ne mem krei. Kaj, kiam kreanto-samideano diskutas pri la lingvo kun fonograf-esperantisto, — ili ne povas akordiĝi. Al la «simplita» formo, la dua respondas per citado el «kompleta gramatiko», kaj kiam la unua «ĉuas», la dua kolere admonas pri la disciplino kaj la oficiala obo. La tipa «fluparolanto» ne disputas, li ridetas kaj daŭrigas sian vojon, lasante la grumblulon fosi, profundigi la sulkon oficialan.

Parolantaj grupoj, intimaj kluboj, lokaj societoj — kie Esperanto senbrue kaj ame floras — tien direktigu niaj paŝoj, en ili ni serĉu la vivon de la lingvo. Nia unua impresio estas, ke tie oni parolas neklasikan, nekorektan lingvon, langaĵon plenan de eraroj... Sed, ni haltu en nia severa juĝo. Ne forgesu unue, ke en la komenco ni konsentis studi senpartie lingvajn faktojn, kun la firma sento ke ĉiu natura fakto estas fakto, do io pli grava ol teorio. Due, ni komprenu ke ne temas pri komencantoj, kiuj ne finlernis... Estas grupoj kaj kluboj kun spertaj multjaraj anoj... kiuj dirante ĝis la... eta..., tre bone scias ke la plena formo estas ĝis la revido, malgranda. Trie, ni lernu iom el la novtempa lingvistiko, kiu trovas «erarojn» de infanoj pli bonsencaj, ol «korektan» stilon de gepatroj, kiu opinias pli valoraj la «nekorektaĵojn» de loka dialekto, ol la abstraktajn regulojn de skolastoj. La vivo ĉiutage ridas pri pedantaj reguletoj. Hodiaŭ ni prave ŝanĝas la lingvon por nia oportuno, kiel niaj praavoj iam ŝanĝis la sian por kontentigi tiaman bezonon.

Pedantoj tamen posedas unu avantaĝon: kiam ili kondamnas novaĵon, ili tenas en la mano oficialan libron, kiu enhavas precize presitajn formojn. Ni, uzantoj de la vivanta lingvo, tian libron ne havas; kaj se ĝi estus hodiaŭ presita, postmorgaŭ ĝi jam ne estus valida. Ni posedas tamen ion pli valoran por nia celo: la lingvon vivantan. Tiu nevidebla kaj nesribita bazo vivas en

la koro de ĉiuj veraj esperantistoj, kaj ili ĉiuj — slavo, rumanoj, hungaroj, flandroj, francoj, k.a. tute kunsentas, akordiĝas inter si. Sub unu nura kondiĉo, ke ili flue posedas la lingvon, tralernis la Zamenhofan verkaron. Se jes, kontraŭ la multforma variado de pedantoj, el kiuj ĉiu volas ŝtonigi la lingvon laŭ sia propra rigideco, — ekstaras la unuanima voĉo de parolantoj, kia ajn estas ilia nacieco.

Iom larĝa buŝa uzado de Esperanto komenciĝis nur post la unua kongreso. Ne multaj estis la fajrujoj de tiu renaskiga movado, sed gravis ilia ekzistado, kiel gravas ĉiu komenco. De Orient' al Okcidento, ili estis maldense dissemitaj: Vladivostok, Tiflis, Moskva, Odesa, Petrograd, Kovno, Varŝava, Krakow, Genevo, Dresden, Parizo, Barcelona, eble ankoraŭ 4-5 urboj. Nur en Petrogrado tiutempa estis pli ol mil samideanoj el kiu duono en grupoj («rondetoj» laŭ tiutempa esprimo) vige parolantaj kaj funde posedantaj la lingvon. Tiu ekzemplo montras ke jam tiam estis sufiĉe vasta kampo por la lingva formiĝo per la buŝ-uzado. Antaŭa generacio estis ankoraŭ amaso da abonantoj, legantoj, kolektantoj, propagandistoj, inter kiuj nur escepte renkontiĝis «fluparolantoj», preskaŭ same maloftaj kiel lastaj volapükanoj de tiu epoko. Sed post 1919 la esperantistaro jam tute alia aspektis. Ĝia unua kerno estis — ne kelkaj eminentuloj kiel antaŭe — sed, vasta aro, vera popolo de samideanoj, por kiuj Esperanto estas kvazaŭ dua hejma lingvo, flue parolata, ofte uzata, kaj ĉefe, kore sentata.

Oratoroj en Esperanto ekaperis jam pli frue, sed nur kiel «maloftaj birdoj», kies rondvojaĝoj estis epok-farantaj, kies paroladoj estis longe atendataj kaj profunde sentataj regalaĵoj. Por la miloj da Esperantistoj, kiuj ellernis la lingvon per broŝuroj, la belaj paroladoj venis kiel iniciado en la novan mondon, idealan Esperantujon, tiom bele prikantitan de H. Boucon en la poemeto: «Regno konata...» Kvazaŭ post longa pena vojado tra sabloj, rokoj kaj montoĉenoj, — subite aperis sur la horizonto la blua rubando de la freŝa maro, borderita je verdaj plantaroj, kie trilas najtingaloj kaj flustras riveretoj. Granda blovo da vivo. Tion alportis niaj oratoroj al Esperantujo kaj tion ĝi neniam forgesos.

\*\*\*

(Finota)

Verantv. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond, Postbus 342, Brussel. — Drukkerij: J. Van Laer, Korte Begijnestraat 38, Turnhout